

Heinrich Heine,
Milde fluas tra la
kor’

tradukita de Valentin Melnikov

Milde fluas tra la kor’
kanto primavera.
Flugu, melodi-sonor’
en la vast’ aera.

Flugu longe, sen ripoz’
super domoj flutu.
Se troviĝos tie roz’ –
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo
“Frühlingsbotschaft” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17) en Esperanton de
Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15
17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo
estas - kun permeso de
s-ro Valentin Melnikov -
prenita el ties reta kolekto
[http://www.esperanto-mv.
pp.ru/Melnikov](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov) . Vidu:
[http://www.esperanto-mv.
pp.ru/Melnikov/Heine.
html](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html). Vidu ankaŭ: [http:
//www.esperanto.mv.ru/
Melnikov/index.html](http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html) .*

Heinrich Heine,
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt
Liebliches Geläute
Klinge, kleines Frühlingslied,
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,
Wo die Blumen sprießen,
Wenn du eine Rose schaust,
Sag, ich laß sie grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17).*

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en
la reta kolekto “Gutenberg.Spiegel” sub
[http://gutenberg.spiegel.de/
?id=5&x_d=1136&kapitel=10&cHash=
3da378c6dbfruehlin#gb_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x_d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found) .*

Heinrich Heine,
Printempa saluto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Irás ĉarma sonoret’
Tra de mi animon.
Sonu printemo kantet’
En la malproksimon!

Ĝis la dom’ forsonu vi,
Kie floroj pendas!
Diru al la roz’, ke mi
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo
“Frühlingsbotschaft” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17) en Esperanton
de LUDWIG EMIL MEIER
(*1847-02-16 – †1919) en
1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14
15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la
poemo estas vere iom fuŝe
tradukita. Ĝi aperis en pro-
gramo de koncerto el la jaro
1908 (laŭ informo de la
dana s-ano Lars Kromann
[lars.kromann@mail.dk].
Pri Ludwig Emil Mei-
er rigardu ankaŭ la vi-
kipedian retejon [http:
//eo.wikipedia.org/
wiki/Ludwig_Emil_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier) .
Li verkis interalie la kant-
libreton “Esperantista Kan-
taro”, kiu aperis en 1907
ĉe la Esperanta eldonejo de
Hans Theodor Hoffmann en
Berlino.*